I F E F

(Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

STATUTO

kun Aldonoj

ĜR Ĝenerala Regularo

de la Statuto

KR Kongresa Regularo

FR Regularo Faka Komisiono

FL Tabelo pri Limdatoj

OG Organigramo

Regularo pri datum-protektado (GPRD)en IFEF

2019.05.06

ENHAVO

Paĝo

I. ĜENERALAĴOJ 4
§ 1 Nomo 4
§ 2 Celoj kaj porcelaj organizoj 4
§ 3 Neŭtraleco 4
§ 4 Lingvo. 4
§ 5 Eksteraj rilatoj. 4
§ 6 Agadperiodoj. 4
§ 7 Respondeco de la Federacio 4
II. MEMBRECO 5
§ 8 Membrokategorioj 5
§ 9 Apogantoj 5
§ 10 Aliĝkondiĉoj 5
§ 11 Eksiĝo kaj eksigo 5
III. KOMITATO 5
§ 12 La komitato estas la decida organo de IFEF 5
§ 13 Konsisto kaj elektoj de la komitato. 5
§ 14 Anstataŭado de komitatano 6
§ 15 Respondeco de la komitatanoj 6
IV. ESTRARO 6
§ 16 Konsisto de la estraro 6
§ 17 Elektoj de la estraranoj 6
V. LABORMANIERO 6
§ 18 Kunsidoj 6
§ 19 Rajtoj de la membraro 7
§ 20 Voĉdonadoj 7
VI. FINANCOJ, ORGANO, ARKIVO 8
§ 21 Financoj 8
§ 22 Federacia organo 8
§ 23 Arkivo 8
VII. DIVERSAĴOJ 8
§ 24 Revizio 8
§ 25 Konfliktoj 8
§ 26 Likvido 8
§ 27 Duboj kaj demandoj 8
§ 28 Aprobo kaj valido 9

*****

Aldonaĵoj:

VIII. Aldono ĜR (ĜENERALA REGULARO DE LA STATUTO) . .10
§ 2 Celoj kaj porcelaj organizoj 10
§ 5 Eksteraj rilatoj. 10
§ 8 Membrokategorioj 11
§ 9 Apogantoj 12
§ 10 Aliĝkondiĉoj 12
§ 11 Eksiĝo kaj eksigo 12
§ 13 Konsisto kaj elektoj de la komitato. 13
§ 14 Anstataŭado de komitatano 14
§ 16 Konsisto de la estraro 15
§ 17 Elektoj de la estraranoj 17
§ 18 Kunsidoj 18
§ 19 Rajtoj de la membraro 18
§ 20 Voĉdonadoj 18
§ 21 Financoj 18
§ 22 Federacia organo 19
§ 24 Revizio 19
IX. Aldono KR (KONGRESA REGULARO) 20
A. Ĝeneralaĵoj . . . . . …20
B. Organizado . . . . . .…..20
C. Kongresanoj . . . . . ….21
D. Financoj. . . . .……..….21
E. Oficiala programo . . . . . ….22
Apendico (TABELO pri Modelo da Programo)…… 24
X. Aldono FR (REGULARO DE LA FAKA KOMISIONO) . .25
A. Ĝeneralaĵoj . . . . . ….25
B. Taskoj . . . . . ….25
C. Konsisto 25
D. Elektoj . . . . . ….26
E. Labormetodo . . . . . ….26
F. Fakprelegoj ekster federaciaj kongresoj 27
G. Demisioj . . . . . ….27
XI. Apendico TL (TABELO PRI LIMDATOJ) 28
XII. Apendico OG (ORGANIGRAMO) 29

. Regularo pri datumprotektado(GPRD) en IFEF 30

*****

IFEF - STATUTO

ĜENERALAĴOJ

§ 1 Nomo kaj adreso

La nomo de la organizo estas: Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). En tiu ĉi Statuto ĝi estas nomata la "Federacio" aŭ "IFEF"[*], kies adreso estas ĉe la funkcianta sekretario.

§ 2 Celoj kaj porcelaj organizoj

La celoj de la Federacio estas:

a) disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto inter fervojistoj, ĉe fervojistaj organizoj kaj fervojaj instancoj;
b) kontaktigi aktivajn kaj emeritajn fervojistojn, kiuj scipovas aŭ lernas Esperanton, principe, estante federacio, organizitaj en landaj asocioj;
c) aranĝi internaciajn kongresojn kaj laŭoportune kromajn kunvenojn;
d) eldoni oficialan organon, fakan materialon kaj terminaron;
e) evoluigi la fervojfakan lingvon, gardi ĝian unuecon kaj zorgi pri ĝia ĝusta uzado;
f) kontribui al faka klerigo kaj ĝenerala kulturo de la membroj;
g) por la faka agado funkciigi fakan komisionon, organizita laŭ aparta regularo.

§ 3 Neŭtraleco

La Federacio estas faka, kultura organizo kaj, escepte de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, estas sendistinge neŭtrala rilate al ĉiaj ajn homaj grupiĝoj, respekte de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

§ 4 Lingvo

La oficiala lingvo de IFEF estas la internacia lingvo Esperanto.

§ 5 Eksteraj rilatoj

Por atingi siajn celojn IFEF, laŭ konveneco, povas decidi membrecon, subtenon, kunlaboron kun aliaj organizoj, esperantistaj kaj alitipaj.

§ 6 Agadperiodoj

1) La administra jaro estas la kalendara jaro (01/01-31/12).
2) La organiza jaro komenciĝas tuj post la federacia kongreso.

§ 7 Respondeco de la Federacio

Pri la agoj de siaj reprezentantoj IFEF respondecas nur en tia amplekso, ke tiuj agoj okazis laŭ la kompetentecoj, kiujn Statuto, Regularoj kaj kongresaj decidoj difinas por ĉiu funkcio.

II. MEMBRECO

§ 8 Membrokategorioj

En la Federacio kunagadas jenaj membroj:

1) asociaj membroj de la aliĝintaj landaj asocioj;
2) individuaj membroj el landoj, kie ne ekzistas landa asocio;
3) distingitaj anoj, nomumitaj de la komitato pro iliaj meritoj por IFEF.

§ 9 Apogantoj

Apogantoj estas personoj aŭ organizoj, kiuj subtenas morale kaj finance la celojn de la Federacio. Ili ne estas membroj (§ 8).

§ 10 Aliĝkondiĉoj

Fervoijstaj esperantistaj landaj asocioj, laŭregule organizitaj, povas aliĝi al la Federacio, kondiĉe ke ilia asocia statuto ne kontraŭas la IFEF-Statuton.

Individuaj membroj povas aliĝi al la Federacio, kondiĉe ke ili respektos la IFEF-Statuton.

§ 11 Eksiĝo kaj eksigo

1) La membreco, respektive, de landa asocio/individua membro finiĝas:
   a) per skriba eksiĝdeklaro/demisio;
   b) ne-pago de la IFEF-kotizo/(j);
   c) pro agadfino/morto.
2) Eksigo de landa asocio aŭ de individua membro povas okazi pro agado kontraŭ la celoj de IFEF kaj pro malestimigo de ĝia reputacio aŭ de tiu de la Esperanto-movado. Kompetencas kaj decidas la komitato.

III. KOMITATO

§ 12 La komitato estas la decida organo de IFEF.

§ 13 Konsisto kaj elektoj de la komitato.

1) Ĝi konsistas el komitatanoj kaj ties anstataŭantoj (aŭskultantoj) delegitaj de propraj landaj asocioj por ilin reprezenti.
2) Se necesas reprezenti apartan komisionon aŭ laborgrupon, la komitato povas alelekti kromkomitatanon.
3) La komitatanoj elektas inter si la ĉefkomitatanon kaj ties anstataŭanton.

§ 14 Anstataŭado de komitatano

1) Landa asocio, landa sekcio aŭ komisiono rajtas skribe delegi por difinita komitatkunsido samrajtan anstataŭanton por komitatano aŭ kromkomitatano malhelpata partopreni en tiu kunsido.
2) Landa asocio, landa sekcio aŭ komisiono, kiu povas delegi nek komitatanon, nek anstataŭanton al komitatkunsido, rajtas skribe voĉdoni kaj, se ĝi mem faris proponojn por la kongresa tagordo, ĝi rajtas skribe peti alian landan asocion aŭ la estraron defendi ilin.

§ 15 Respondeco de la komitatanoj

1) Komitatano aŭ kromkomitatano prezentas kaj defendas proponojn kaj decidojn de sia landa asocio, sekcio aŭ komisiono, tamen li estas persone respondeca pri siaj agoj kaj decidoj. Li devas plenumi la decidojn de la komitato, eĉ se li ne samopinias.
2) Kaze ke landa asocio, sekcio aŭ komisiono malaprobas la agadon de sia komitatano, ĝi povas forigi lin de la posteno antaŭ fino de oficperiodo, sed devas tuj anstataŭigi lin, kaj anonci tion al la ĉefkomitatano.

IV. ESTRARO

§ 16 Konsisto de la estraro

La estraro de la Federacio konsistas el 5 (kvin) membroj, nome: prezidanto, sekretario, kasisto, redaktoro kaj gvidanto de la faka komisiono, kiuj estras dum 3 (tri) jaroj kaj estas reelekteblaj.

§ 17 Elektoj de la estraranoj

La estraranoj estas elektataj de la komitato.

V. LABORMANIERO

§ 18 Kunsidoj

1) Komitatlaboroj:
a) La komitato kunvenas okaze de la federacia kongreso kaj eventuale ekster la kongreso en urĝaj kazoj.
b) Dum la kongreso okazas:
b.1) 1 (unu) publika plenkunsido, en kiu ĉiuj IFEF-anoj rajtas diskuti, sed voĉdoni rajtas nur la komitatanoj, kromkomitatanoj aŭ anstataŭantoj;
b.2) pliaj kunsidoj, laŭ bezone.

c) La komitato povas funkcii skribe ankaŭ por voĉdoni dum la tuta jaro pere de la ĉefkomitatano.

2) Estrarlaboroj:
La estraro, krom en la kongreso, kunvenas almenaŭ 2 (du) foje jare.

3) Komisionlaboroj:
IFEF-komisionoj kunvenas plurfoje en kunsidoj kutime publikaj.

§ 19 Rajtoj de la membraro

1) Proponojn por la tagordo de la sekvonta kongreso rajtas direkti al la ĉefkomitatano:
a) estraranoj, komitatanoj kaj individuaj membroj;
b) landaj asocioj kaj ties membroj pere de siaj komitatanoj.

2) La proponoj devas atingi la ĉefkomitatanon plej malfrue la 31-an de decembro por esti pritraktataj en la komitatkunsidoj de la sekvonta kongreso.

3) En la publikaj kunsidoj la membroj rajtas diskuti pri la punktoj de la tagordo.

4) Sub la punkto "Libera diskutado" ĉiuj membroj rajtas organizi debaton pri aferoj koncernantaj IFEF, kies konkludoj tamen ne devigas la Federacion je certa faro.

§ 20 Voĉdonadoj

1) Decidojn en kunvenoj, en kiuj partoprenas en voĉdonado malpli ol la 1/2 (duono) de la voĉdonrajtaj komitatanoj aŭ de la estraro, oni submetu al plia voĉdono en alia kunveno, en kiu sufiĉos la plimulto de la "por" kaj de la "kontraŭ" esprimitaj voĉoj.

2) Proponoj skribe senditaj de la ĉefkomitatano al la komitatanoj povas esti decidaj nur, kiam pli ol la 1/2 (duono) de la voĉdonrajtaj komitatanoj partoprenas la voĉdonon.

3) Por decidoj kaj por ŝanĝoj en la Regularoj validas la plimulto de la "por" kaj de la "kontraŭ" esprimitaj voĉoj.

4) Por ŝanĝi la Statuton aŭ por likvidi la Federacion nepre necesas, ke 3/4 (tri kvaronoj) de ĉiuj voĉdonrajtaj komitatanoj partopreni en voĉdonado kaj ke 2/3 (du trionoj) de la esprimitaj voĉoj estu "por".

5) Pri personoj oni voĉdonu en kunsidoj sekrete kaj skribe.

6) Kaze de voĉegaleco oni konsideru la proponon kiel malakceptitan.

VI. FINANCOJ, ORGANO, ARKIVO

§ 21 Financoj

1) La financoj de la Federacio konsistas el:
   a) la havaĵo (kapitalo, fondusoj, oficejaj objektoj);
   b) regulaj enspezoj (kotizoj, ktp);
   c) neregulaj enspezoj (subvencioj, donacoj, loterioj ktp).

§ 22 Federacia organo

La Federacio eldonas oficialan organon. Ĝi estas redaktata laŭ la fundamentaj principoj de IFEF esprimitaj en § 2 kaj § 3 kaj laŭ la "ĝeneralaj gvidlinioj" fiksitaj de la estraro.

§ 23 Arkivo

Pri la arkivo respondecas la sekretario.

VII. DIVERSAĴOJ

§ 24 Revizio

La komitato elektas en la kongreso tri revizorojn kaj unu vicrevizoron.

§ 25 Konfliktoj

1) Konfliktoj inter la membroj, landaj asocioj inter si aŭ kun la estraro aŭ komitato devas esti solvitaj interne de IFEF. Se konfliktantaj partioj ne sukcesas interkonsenti, konflikta komisiono prijuĝas kaj findecidas.
2) La konflikta komisiono konsistas el tri personoj, po unu el la disputantaj partioj kaj tria, neŭtrala, ambaŭflanke akceptita, kiu prezidas. Se ne eblas interkonsento pri la tria persono, la estraro determinas la prezidanton de la konflikta komisiono.

§ 26 Likvido

1) Se necesas likvidi la Federacion, la komitato elektas komisionon, kiu ordigas la kurantajn aferojn kaj indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiton.
2) La restanta havaĵo estu konservata dum 7 (sep) jaroj ĉe internacia esperantista aŭ kultura organizo fiksita de la likvidanta komisiono. Poste ĝi transiru al tiu organizo mem, se intertempe nova fervojista federacio ne fondiĝis.

§ 27 Duboj kaj demandoj

Pri ĉiuj duboj kaj demandoj, kiuj ne estas traktitaj en tiuj ĉi Statuto kaj Regularoj, decidas la komitato aparte.

§ 28 Aprobo kaj valido

1) Tiuj ĉi tekstoj de la Statuto kaj Regularoj estis formulitaj laŭ la prilaboradoj de la statutrevizia komisiono kaj akorde kun la komitatanoj dum la eksterordinara komitatkunsido en Dijon, Francio la 14an de aprilo 2015.
2) La aplikaj modifoj de la Statuto estas priskribitaj en la Regularoj.
3) La tekstoj estis aprobitaj per reta voĉdonado, la 12-an.de majo 2015.
4) La Statuto kun Aldono Ĝenerala Regularo kaj Aldonoj KR kaj TL validas ekde la 1-a de januaro 2016.
   [Ili anstataŭas la Statuton/Regularojn de 01.01.1990 kaj sekvajn modifojn].

*****

La unua fondiĝo de internacia fervojista Esperanto-organizo okazis la 7-an de septembro 1909 en Barcelona (ES), sub la nomo "Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj" (IAEF).
(*) IFEF estis refondita la 4-an de aŭgusto 1948 en Amsterdam (NL) sub la nomo "Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj", valida ĝis 1953, poste Internacia Federacio Esperantista Fervojista", valida ĝis 1963.
Ekde 1963 ĝi nomiĝas Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF).

*****

Postaj modifoj:

Varna 2016: unua modifo punkto 13 statuto kaj regularo**.**
Colmar 2017: Ĝenerala regularo punktoj: 10-aliĝkondiĉoj;
13 - Konsisto kaj elekto de la komitato; 17- Elektoj;
Kongresa regularo: B - organizado, 8 - adreso de kongresano**.**
Wroclavo 2018: IX interŝanĝo punkto D kun E - kongreskotizo
2018.10.20 reta voĉdono: modifo al punkto 18 forstreko de nepublika k-kunsido dum kongreso**.**
Malago 2019: ĜR Elektoj 17 a) aldono linio pri gvidanto FK.
Aldono de: Regularo pri datumprotektado(GPRD) en IFEF

ĜR Ĝenerala Regularo
de la Statuto

VIII. Aldono ĜR (ĜENERALA REGULARO de la Statuto)

Ĝenerala Regularo § 2, Celoj kaj porcelaj organizoj

Pri kongresaranĝoj, terminaraj kaj fake aplikaj aferoj kaj respektivaj limdatoj validas:

ALDONO KR (kongresa regularo),
ALDONO FR (regularo por la Faka Komisiono),
ALDONO TL (tabelo pri limdatoj).

Ĝenerala Regularo § 5, Eksteraj rilatoj

a) IFEF membras en Terminologia grupo (*RailLexic)* de la *Union International de Chemin de fer* (UIC), pri fervojfakaj terminoj.

b) Kiel "Aliĝinta faka asocio" de la "Universala Esperanto-Asocio" (UEA), laŭ ties statuto, IFEF rajtas delegi komitatanon "A" ĉe la UEA-komitato. La kondiĉojn kaj limdatojn pri tio UEA diskonigas sufiĉe frue antaŭ la elektoj kaj laŭeble ili aperu en la IFEF-Organo. Proponoj pri tio devas alveni al la sekretario plej malfrue unu monaton antaŭ la limdato de la elektoproceduro. Se alvenas pluraj proponoj, la estraro decidas pri la kandidato kaj anoncas la elektiton al UEA. Antaŭe la proponita kandidato skribe devas deklari, ke li akceptas la kandidatecon kaj ke estas preta partopreni en la Universalaj Kongresoj (UK). La taskoj de komitatano "A" estas:

b.1) reprezenti IFEF ĉe UEA;

b.2) kunlabori kun la UEA-komitato;

b.3) okazigi kontaktkunvenon por fervojistoj en universalaj kongresoj;

b.4) raporti pri sia agado al IFEF kaj fari proponojn por plifirmigi la reciprokajn rilatojn.

c.1) IFEF kunlaboras kun "Internacia Fervojista Federacio por Kulturo kaj Libertempo" [*Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots* (FISAIC)].

c.2) La landaj IFEF-asocioj laŭeble estu membroj de FISAIC pere de ties landaj sekcioj.

c.3) La IFEF-kongresoj kaj aliaj gravaj internaciaj manifestacioj estas envicigataj en la aranĝo-kalendaron de FISAIC, konforme al ties statuto.

c.4) Post ĉiu IFEF-kongreso la sekretario informu FISAIC pri la planota(j) kongreso(j).

c.5) Interkonsente kun FISAIC la Federacio rajtas honori membrojn per

FISAIC-medaloj. Honoroto devas havi eksterordinarajn kulturajn meritojn en fervojista medio, ĉefe sur internacia kampo, kaj devas esti membro de FISAIC-sekcio.

c.6) Principe la komitato elektas la honorotajn membrojn, sed ĝi povas delegi tiun rajton al la estraro por la daŭro de tri (3) jaroj. Tiakaze la estraro elektas la honorotan personon konsente kun la respektiva landa asocio kaj laŭ la kondiĉoj interkonsentitaj kun FISAIC.

c.7) Kutime la medaloj estas transdonataj al la honorotaj personoj flanke de FISAIC mem. Tio okazu laŭeble en IFEF-kongreso.

d) IFEF estas subtenanta membro de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

e) IFEF kunlaboras kun Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEM).

f) IFEF kontrakte kunlaboras kun Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA).

g) IFEF kunlaboras kun Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).

h) IFEF kontrakte kunlaboras kun Internacia Ligo de Instruistoj Esperantistoj (ILEI).

i) IFEF havas delegiton ĉe UEA-Terminologia Esperanto-Centro (TEC).

Ĝenerala Regularo § 8, Membrokategorioj

§ 8 Al 3)

a) honoraj prezidantoj,

b) honoraj membroj,

c) membroj de la Honora Patrona Komitato.

§ 8 Al 3.a)

La kandidato devas esti estinta prezidanto minimume dum 3 (tri) elektoperiodoj.

§ 8 Al 3.b)

1) Proponon por honoraj membrecoj rajtas fari la estraro aŭ almenaŭ 5 (kvin) komitatanoj el pli ol 2 (du) landaj asocioj. La kandidato devas esti IFEF-membro kaj havi eksterordinarajn meritojn por la Federacio.

2) Al la propono oni aldonu mallongan priskribon pri la vivo kun la plej gravaj datoj, kaj pri la servoj faritaj por IFEF, kaj eventualan liston de laboraĵoj verkitaj en Esperanto.

3) La komitato povas delegi la estraron dum 3 (tri) jaroj la rajton elekti kandidaton por honora membreco interkonsente kun ties landa asocio. Havante delegon, se cirkonstancoj malfaciligas antaŭan aprobon, la estraro povas peti postan aprobon de la komitato.

4) Por la plua traktado de la propono validas § 19 kaj § 20.

§ 8 Al 3.b)

La maksimuma nombro de vivantaj honoraj membroj ne transiru 15 (dekkvin).

§ 8 Al 3.a) kaj 3.b)

Honoraj membroj kaj honoraj prezidantoj estas liberaj de kotizpago kaj laŭdezire ricevas la protokolojn de la nepublikaj komitatkunsidoj.

§ 8 Al 3.c)

La honora patrona komitato estas speciala konstanta reprezenta organo de la Federacio, kiu konsistas el personoj elektitaj inter ministroj, altrangaj fervojaj funkciuloj kaj nefervojistaj eminentuloj pro siaj meritoj por IFEF. Proponon por la elekto rajtas fari la estraro aŭ la koncerna landa asocio, kiuj devas konfirmi kaj prezenti koncize la meritojn de la kandidato. Pri la akcepto de la propono, antaŭ la aprobo fare de la komitato, provizore decidas la estraro. Ties membroj, dumvivaj, estas liberaj de IFEF-kotizpago.

Ĝenerala Regularo § 9, Apogantoj

La estraro decidas pri la akcepto kaj raportas al la komitato pri la financa kontribuaĵo de apogantoj.

Ĝenerala Regularo § 10, Aliĝkondiĉoj

§ 10

La minimuma membronombro por aliĝo kiel landa asocio sen komitatano, estas 5 (kvin); por havi komitatano(j)n vidu suben § 13 1) a).

Membriĝo estas ebla por minimume du sinsekvaj jaroj

La membreco de landa asocio efektiviĝas post la akcepto fare de la komitato kaj post la pago de la jarkotizoj.

El ĉiu lando (ŝtato), principe, povas esti reprezentata nur 1 (unu) landa asocio. Se pro naciaj cirkonstancoj ne eblas starigi tutŝtatan asocion, IFEF akceptas plurajn sekciojn el la tereno de la respektiva ŝtato. Pri la rajtoj kaj voĉdonado de komitatano(j) validas la sumo de la sekciaj IFEF-membroj (§ 12). La sekcioj decidas inter si pri la komitatano(j).

La membrecon de individua membro ordigas kaj registras la kasisto.

§ 10

a) La jarkotizo(j) por la kuranta administra jaro (§ 6) pagendas de la landaj asocioj kaj de individuaj membroj al la IFEF-kasisto ĝis la 31-a de Januaro. La novaj membroj pagas la kotizon de la kuranta administra jaro kiam ili aliĝas. La landa asocio indikas al la IFEF-kasisto ĝis la 31-a de januaro la nomojn de la membroj por kiuj oni pagos.

b) Ĉiujare en la kongreso la komitato konfirmas la kotizojn por la venonta administra jaro (§ 6), aŭ nove fiksas ĝin per kongrespropono kaze de intencota ŝanĝo. La kotizo inkluzivas la abonon al la IFEF-organo.

Ĝenerala Regularo § 11, Eksiĝo kaj eksigo

§ 11 Al 1) Laŭeble la komitato devas esplori krizajn situaciojn kaj klopodi helpi por la daŭrigado.

§ 11 Al 1) a)

Eksiĝdeklaro/demisio estu direktata al la sekretario, al la kasisto kaj al la ĉefkomitatano.

Ĝenerala Regularo § 13, Konsisto kaj elektoj de la komitato

§ 13 Al 1) kaj 2)

a) Komitatanoj, ties anstataŭantoj kaj kromkomitatanoj devas esti IFEF-membroj dum du jaroj kaj devas skribe deklari pretecon konservi la oficon dum la trijara laborperiodo.

b) Por la plia proceduro validas §§ 19 kaj 20.

§ 13 Al 1)

a) La minimuma nombro de asociaj membroj rajtiganta havi komitatanon, estas 10 (dek). Landa asocio kun 10 (dek) ĝis 40 (kvardek) membroj delegas 1 (unu) komitatanon kaj 1 (unu) plian por ĉiu komencita 40 (kvardek), maksimume 4 (kvar) komitatanojn.

b) Pri la membronombro decidas la kotizpagoj al la IFEF-kasisto ĝis la fino de la pasinta administra jaro (§ 6).

c) La landaj asocioj skribe komunikas, antaŭ la jarfino, al la ĉefkomitatano, la nomojn kaj adresojn de siaj delegotaj komitatanoj por la venonta organiza oficperiodo kaj, same antaŭ jarfino, pri eventualaj ŝanĝoj.

§ 13 Al 3)

La elekto de kromkomitatanoj okazas en jaro antaŭ estrarelekto. Proponojn rajtas fari la membraro laŭ § 19 Reelekto eblas.

§ 13 Al 3)

a) La elekto de la ĉefkomitatano kaj de la anstataŭanto okazas en jaro antaŭ estrarelekto; la proponojn en la unua komitatkunsidoj rajtas fari nur la funkciantaj komitatanoj. Reelekto eblas.

b) La kandidatoj devas esti estintaj komitatanoj dum minimume 1 (unu) elektoperiodo.

Komitatano aŭ kromkomitatano rajtas komuniki sciigojn kaj peti opiniojn de la komitato pere de aparta cirkulero.

La komitato estas kompetenta pri:

a) aprobo de la Statuto kaj Regularoj;

b) direkto de la ĝenerala agado de la Federacio;

c) aliĝo kaj eksigo de ĉiaj membroj;

d)elektoj de la estraro, ĉefkomitatano kaj anstataŭanto, krom-komitatanoj;

e) decidoj por la agado de la estraro;

f) starigo de komisionoj, konfirmo de ties respondeculoj kaj elekto de komisiitoj por specialaj taskoj;

g) aprobo de la estraraj jarraportoj;
h) buĝetaprobo, fikso de la jarkotizo kaj ekzamenado de la financoj;
i) nomumo de honoraj prezidantoj, honoraj membroj kaj membroj de la Honora Patrona Komitato;
k) kunlaboro kun aliaj esperantistaj, kulturaj kaj sindikataj organizoj en la limoj de neŭtraleco;
l) proponoj flanke de la membraro (§ 19);
m) akcepto de proponoj prezentitaj post limtempo;
n) lokoj kaj periodoj de la sekvontaj kongresoj.

Pri la interna organizado kaj disvolviĝo de landaj asocioj kaj pri ties rilatoj kun ŝtataj aŭ fervojaj instancoj la komitato povas esprimi nur rekomendojn.

La ĉefkomitatano:
a) prizorgas la administrajn taskojn de la komitato;
b) invitas la komitaton al kunsidoj kaj al skribaj voĉdonoj interkonsente kun la estraro;
c) akceptas proponojn kaj submetas ilin al la komitato;
d) ricevas la demisiojn de la estraranoj, konigas ilin al la landaj asocioj kaj komitatanoj kaj invitas prezenti kandidatojn; intencota demisio de estrarano aŭ de la komisiona gvidanto devas esti anoncataj al la ĉefkomitatano ĝis la 31-a de aŭgusto antaŭ la fino de oficperiodo.
e) gvidas la Federacion ĝis la sekvonta komitatkunsido kaze de evidenta malfunkciado de la estraro.
f) Per cirkulero instigas la landajn asociojn/komitatanojn sendi la landajn jarraportojn ĝis 28.02 por ke sekretario kaj kasisto kompilu la resuman jarraporton de IFEF.

La anstataŭanto
a) anstataŭas la ĉefkomitatanon, laŭnecese.
b) afergvidas la agadon de la laborgupoj, escepte de la redaktora kaj faka komisionoj.
c) transprenas specialajn taskojn interkonsente kun la ĉefkomitatano.

La ĉefkomitatano kaj anstataŭanto konservas la reprezentantecon de siaj landoj kaj ne ĝuas apartajn rajtojn.

Ĝenerala Regularo § 14, Anstataŭado de komitatano

§ 14 Al 1)

Se ĉeestanta komitatano, pro grava kaŭzo, parte aŭ tute ne povas partopreni en dumkongresa komitatkunsido, li rajtas skribe transdoni sian voĉdonrajton por tiu okazo kaj tempo al alia membro de sia landa asocio aŭ komisiono. La anstataŭanto devas prezenti la rajtigilon al la kunsida prezidanto.

§ 14 Al 2)

Landa asocio (komisiono), ne reprezentata en kongreso, povas sendi siajn skribajn decidojn en fermita letero, kun mencio "voĉdonado", al la IFEF-sekretario, kiu transdonos ĝin al la gvidanto de la kongreskunsidoj, kiu sola rajtas malfermi ĝin dum la respektiva kunsido. Kaze de pripersona baloto li nepre konservu la sekretecon kaj transskribu la voĉo(j)n sur la uzatajn samformajn balotilojn.

Ĝenerala Regularo § 16, Konsisto de la estraro

§ 16

Kaze de vaka posteno en estraro dum la estrarperiodo, la estraro povas funkcii kun minimume 3 membroj.

Kaze de kvarmembra estraro, la prezidanta voĉo estas decida dum balotoj.

Laŭnecese kaj provizore la taskoj de la redaktoro kaj de la gvidanto de la faka komisiono povas esti transprenitaj de la aliaj estraranoj, kiuj inter-konsente distribuu inter si la farendaĵojn kaj informas la landajn asociojn pri la decidoj.

Taskoj de la estraro

La estraro respondecas al la komitato kaj devas fari ĉion utilan kaj eblan por la Federacio, nome precipe:

1) plenumi la decidojn de la komitato;
2) prezenti proponojn;
3) prezenti agad- kaj kas-raportojn de la pasinta, kaj buĝeton por la sekvonta jaroj;
4) respondeci pri la financoj;
5) administri la propraĵon;
6) kunvoki la komitaton, kune kun la ĉefkomitatano, minimume 2 (du) monatojn antaŭ komitatkunsido kaj informi ĝin pri tagordo kaj proponoj;
7) eldoni la federacian organon;
8) starigi kaj aktualigi la laborplanon.
9) aprobi la kongresprogramon kaj kunlabori kun la loka kongresa komitato kaj la koncerna landa asocio.

Funkcioj de la estraranoj

1) ***La prezidanto***:

a) reprezentas la Federacion kaj certigas la ligon kun internaciaj organizoj kaj fervojaj instancoj;
b) prezidas kaj afergvidas la estraron, komitaton kaj kongreson;
c) proponas kaj aktualigas la laborplanon;

d) pro urĝaj kaj esceptaj kazoj rajtas agi anstataŭante estraron kaj komitaton, sed li havigu al si ilian konsenton kiel eble plej baldaŭ.
e) transprenas specialajn taskojn,interkonsente kun la estraro kaj la komitato.

2) ***La sekretario***:
a) administras la Federacion kaj respondecas pri la plenumo de la kurantaj laboroj;
b) anstataŭas la prezidanton, laŭnecese;
c) interkonsente kun la prezidanto kaj la ĉefkomitatano fiksas la tagordon de la estrar- kaj komitatkunsidoj kaj prizorgas ties protokoladon;
d) akorde kun la kasisto kaj la ĉefkomitatano kolektas la jarraportojn de la landaj asocioj kaj kunpretigas laŭ sia kompetenteco ties resumon por plenkunsido kaj la IFEF-organo;
e) transprenas specialajn taskojn interkonsente kun la estraro kaj la komitato;
f) administras la arkivon.
g) La sekretario zorgu, ke la estrarkunsidoj kaj kongreskunsidoj, laŭeble, estu kasede registritaj. Post la kongreso la protokoltekstoj de la komitat-kunsidoj estu kiel eble plej rapide sendataj rekte al la estraranoj kaj komitatanoj.

3) ***La kasisto***:
a) zorgas pri ĉiuj kasaj kaj bilancaj aferoj, akurata librotenado, pretigoj de buĝeto, bilanco (kiu kongruu kun la buĝeto mem) kaj statistikaj tabeloj.
b) akorde kun la sekretario kaj la ĉefkomitatano kolektas la jarraportojn de la landaj asocioj kaj kunpretigas laŭ sia kompetenteco ties resumon por la plenkunsido kaj la IFEF-organo.
c) ordigas kaj registras la membrecon de individua membro;
d) ĝisdatigas la Adresaron de la IFEF.

4) ***La redaktoro***:
a) afergvidas la redaktoran komisionon laŭ ĝeneralaj gvidlinioj fiksitaj de la estraro.
b) prizorgas la eldonadon de la federacia organo en la kadro de la disponeblaj financaj rimedoj kaj konforme al la celoj de la Federacio.

5) ***La gvidanto de la faka komisiono***:
a) afergvidas kaj reprezentas la komisionon kaj donas direktivojn al la sekcioj.
b) La gvidanto de la faka komisiono, kunlabore kun la IFEF-Komitatano "A" ĉe UEA, zorgas por la preparo de la faka kunveno dum la UK.

6) ***La laborgrupoj***
Laŭ la Strategia laborplano de IFEF la estraro fondigas laborgrupojn por unuopaj celoj, kiuj estas necese solvi por bonfunkcianta agado de la organi-

zaĵo. Samptempe la estaro nomumas gvidanton de laborgrupo, kiu respondecas kaj raportas konstante pri ĝia laboro.

Laborgrupo pri eksteraj rilatoj de IFEF
Laborgrupo pri rilatoj interne de IFEF
Laborgrupo pri historio kaj arkivo de IFEF
Laborgrupo pri informado
Laborgrupo pri financado de projektoj
Laborgrupo pri instruado

La laborgrupoj raportu al la estraro kaj komitatanoj ĉiun trian monaton per skriba raporto.

Ĝenerala Regularo § 17: Elektoj

§ 17

a) Elekto de estraranoj, krom gvidanto de la faka komisiono, kies elekto kaj oficperiodo estas regulita laŭ indikioj en FR, por trijara oficperiodo okazas en jaroj kun nombro dividebla per 3 (tri). Reelekto eblas.

b) Estrarano, kiu kandidatiĝas por alia estrarofico, laŭdezire restas kandidato ankaŭ por reelekto en sia antaŭa ofico.

c) Proponojn povas fari la membroj laŭ § 19. Ili enhavu gravajn koncizajn indikojn pri la kandidatoj, minimume kiel:
   1) aĝon;
   2) deĵoroficon/okupon;
   3) agadon por Esperanto (precipe por IFEF kaj por la landa asocio);
   4) fotografaĵon.

d) Necesas skriba aprobo de la interesita landa asocio (aŭ eventuala motivita rifuzo), kiu devas atingi ĉefkomitatanon ĝis 31.12.

e) La kandidato(j) havigu al la ĉefkomitatano, plej malfrue ĝis 31.12 antaŭ elektojaro, deklaron pri sia preteco partopreni en la kunsidoj de estraro kaj komitato dum la koncerna oficperiodo.

f) La ĉefkomitatano publikigu la proponojn, indikojn kaj fotografaĵojn en la IFEF-organo kiel kongresproponojn.

g) La elektoproceduro okazas laŭ § 20. La ĉefkomitatano kaj tri diverslandaj helpantoj elektitaj de la komitato formas elekto-komisionon, kiu aranĝas sekretan elekton kaj konfirmas publike la rezulton en la sama kunsido. Ankaŭ se estas nur unu kandidato, necesas konstati la nombron de la voĉoj.

h) La kandidatoj ne povas ĉeesti dum la elektoproceduro, sed ili voĉdonas, se ili havas rajton.

i) Elektita estas tiu kandidato, kiu ricevas la plej multajn voĉojn. Kaze de voĉegaleco oni revoĉdonu. Se estas sama rezulto, decidas la loto.

k) La oficperiodo de novelektita estrarano komenciĝas tuj post valida elekto.

Ĝenerala Regularo § 18, Kunsidoj

§ 18 Al 1 a)

Al komitatkunsidoj povas esti invitata(j) komisiito(j) por specialaj taskoj, se la tagordo postulas trakti ties taskojn.

§ 18 Al 2 b)

La gvidantoj de komitatkunsidoj, kunlabore de la kasisto, je la komenco devas kontroli la voĉdonrajtojn de la ĉeestantoj.

Ĝenerala Regularo § 19, Rajtoj de la membraro

§ 19 Al 2)

Proponinto, kiu prezentas proponon post la limtempo, devas pruvi, ke antaŭ la fiksita dato ne eblis prezenti ĝin. La komitato decidas ĉu trakti aŭ ne tian proponon.

§ 19 Al 3)

Tamen la kunsido-prezidanto povas limigi la paroltempon de la intervenantoj.

Ĝenerala Regularo § 20, Voĉdonado

§ 20 Al 2)

Plej malfrue 1 (unu) monaton post la limdato de skriba voĉdonado la ĉefkomitatano forsendas cirkuleron al la estraro kaj la komitatanoj pri la rezulto.

§ 20 Al 3) kaj 4)

Pri proponoj oni decidu laŭ la originala teksto, tamen amendon oni povas akcepti, kiam evidentiĝas, ke al la IFEF konvenus pliboniga modifo sen ŝanĝo de la proponsenco.

Ĝenerala Regularo, kompensoj

1) La komitatanoj ne ricevas kompensojn de la Federacio.

2) Por parte kovri la administrajn kaj vojaĝajn elspezojn de la estraranoj kaj ĉefkomitatano, la komitato povas asigni certan sumon en la buĝeto.

3) Por parte kovri la vojaĝkostojn de la komitatano "A" ĉe UEA, okaze de partopreno en universala kongreso (UK), la komitato povas asigni laŭbezone certan sumon.

Ĝenerala Regularo § 21, Financoj

§ 21 Al 1)

La financa kompetenteco de la estraro por elspezoj ekster la buĝeto estas fiksita je eŭroj:

1.1) 160 (cent sesdek) por ripetiĝantaj elspezoj;

1.2) 640 (sescent kvardek) por unufojaj elspezoj.

§ 21 Al 1) b)

Estas du kotiztipoj:

b.1) 9 (naŭ) eŭroj, kun reta sendo de la bulteno IF;

b.2) 15 (dekkvin) eŭroj, kun papera sendo de IF.

Ĝenerala Regularo § 22, Federacia organo

§ 22 Al 1)

La titolo de la IFEF-organo estas "Internacia Fervojisto" (IF).

§ 22 Al 2)

Dum jaro aperu i.a. en la IFEF-organo:

a) en la numero unu: - aktuala listo de la honoritoj de la Federacio;

b) en antaŭkongresa numero: - eventualaj kongresaj proponoj;

c) en la unua postkongresa numero:

c.1) raporto(j) pri la kongreso,

c.2) resumo(j) de la fakprelego(j),

c.3) resumaj tekstoj de "Fervojaj aktualaĵoj", laŭeble, se ne, en la sekva;

d) en la dua postkongresa numero:

d.1) protokolo de la plenkunsido,

d.2) resumo de la jarraportoj.

Ĝi aperas kun 6 numeroj jare.

La redaktora komisiono devas:

Redakti la revuon laŭ la fundamentaj principoj de IFEF kaj la ‘ĝeneralaj gvidlinioj’

Eldoni pojare 6 numerojn

Aperigi artikolojn pri fakaj, movadaj kaj kulturaj temoj

Kunlabori kun ĉiuj laborgrupoj por ricevi informojn pri ties agadkampoj

Ĝenerala Regularo § 24, Revizio

§ 24

La por trijara elekto de la revizoroj okazas en la elektojaro de la estraro. Proponojn al la ĉefkomitatano, ĝis 31.12 antaŭ la elekto, prefere faru la landa asocio de la kasisto, kie plejbone ili devus loĝi. Reelekto eblas nur post trijara paŭzo.

Taskoj de la revizoroj:

a) ekzameni la financojn kaj la librotenadon;

b) konstati kiom da komitatanoj la landaj asocioj rajtas delegi laŭ siaj pagitaj kotizoj ĝis la fino de la pasinta administra jaro (§ 5).

*****

IX. Aldono KR (KONGRESA REGULARO)

A. Ĝeneralaĵoj

1) Tiu ĉi regularo validas por:
   a) internaciaj kongresoj organizataj de landaj asocioj, interkonsente kun la Federacio;
   b) internaciaj kongresoj organizataj de IFEF, interkonsente kun landaj asocioj aŭ aliaj Esperanto-asocioj.
   c) Por aliaj internaciaj renkontiĝoj validas apartaj interkonsentoj inter IFEF kaj la organizantoj.
2) Kutime okazas unu kongreso ĉiun jaron, laŭeble en majo.
3) La kongreso devas konformiĝi al § 2 kaj § 3. Se la organizantoj ne povas garantii la neŭtralecon, la estraro rajtas eksplicitigi kiel kongreson nur parton de la aranĝoj.

B. Organizado

4) Kutime la landa asocio invitas al la kongreso.
3 (tri) jarojn antaŭ la kongreso, la komitato laŭeble provizore elektu la kongreslandon.
2 (du) jarojn antaŭ la kongreso la komitato devas konfirmi tiun elekton kaj samtempe la gastigonta lando laŭeble konatigu la kongreslokon.
1 (unu) jaron antaŭ la kongreso estu prezentita provizora programo kaj aliĝilo.
5) La gastigonta landa asocio elektas la lokan kongresan komitaton (LKK), kiu aranĝas la kongreson laŭ jenaj ĝeneralaj indikoj:
   a) La LKK-anoj skribe devas akcepti la enhavon de tiu ĉi kongresa regularo; ekzemplero de la skribaj akceptoj estu sendataj al la sekretario;
   b) La LKK konsistu minimume el prezidanto, sekretario kaj kasisto kaj laŭbezone oni povas elekti helpantojn por apartaj taskoj;
   c) oni elektu revizorojn por kontrolo de bilanco kaj librotenado laŭ la reglamentoj de la respektiva lando;
   d) La LKK starigu provizoran kongresprogramon, kunlabore, interkonsente kun kaj aprobe de la estraro kaj kun aparta atento kaj respekto de la subaj punktoj D).9) kaj E).14), 17) kaj 18);
   e) La LKK kreu specialan kongresemblemon, kiu laŭeble aperu sur ĉiaj eldonaĵoj preparitaj en konekso kun la kongreso;
   f) La LKK pretigu konvenan kongresmaterialon, minimume nome:
      1) kongresinsignon;
      2) kongreslibron, kiu minimume enhavu:

2.1) la oficialan programon,
2.2) la tagordojn de ĉiuj kunsidoj,
2.3) la temo(j)n de la kongresa(j) fakprelego(j),
2.4) laŭeble kaj rekomendinde, ĉiujn priskribojn de fakaj, kulturaj, artaj kaj turismaj aranĝoj.

g) la LKK funkciigu informservon, antaŭ, dum kaj post la kongreso, por kiel eble plej bone provizi per taŭga materialo la publikajn kaj fakajn komunikilojn, la kongreslokajn fervojistojn, same kiel la kongresanaron;

h) la LKK disponigu taŭgajn salonojn por ĉiuj kunsidoj (de estraro, komitato, komisionoj, fakprelegoj, ktp) oficiale starigitaj de IFEF, laŭ la programo kaj la tagordoj.

6) Ĉiuj oficialaj leteroj alvenintaj por la kongreso estas kongresa(IFEF) propraĵo. Oni devas transdoni ilin al la IFEF-sekretario.

C. Kongresanoj

7) La kongreson rajtas partopreni:
a) la IFEF-membroj;
b) iliaj familianoj;
c) aliaj esperantistoj;
d) interesitaj neesperantistoj.

8) Por publikigi la adresojn de la kongresanoj, necesas ilia antaŭa konsento.

D. Financoj

9) Por kovri la organizajn elspezojn, la LKK postulas kongreskotizon, pagendan ĉe la aliĝo. Post ĉiu enorda aliĝo oni sendu konfirmilon, sur kiu estu indikitaj minimume kongresnumero kaj nomo de la aliĝinto. La kongreskotizo ne estas transigeblaj al alia persono. Kaze de nepartopreno la kongreskotizo ne estas repagebla al la aliĝinto, kiu tamen rajtas ricevi la kongresmaterialon.

10) La LKK, interkonsente kun la estraro, fiksas la bazan kongreskotizon, kiu validas ĝis kvin monatoj antaŭ la kongreso. Post tiu dato LKK estas rajtigita plialtigi ĝin.
IFEF-membroj rajtas rabatitan kotizon. Familianoj kaj junuloj aĝaj malpli ol tridek jaroj pagas la duonon el la koncerna kongreskotizo.

11) Senpagajn aliĝinskribojn ricevas la estraranoj, ĉefkomitatano, honoraj prezidantoj, honoraj membroj, membroj de la honora patrona komitato, la sekretarioj de la faka komisiono kaj la LKK-anoj.

12) La LKK pagu la tranoktkostojn por 4 (kvar) noktoj por estraranoj, ĉefkomitatano, sekretarioj de la faka komisiono.

13) Antaŭ la 31-a de decembro la LKK prezentas buĝeton al la estraro

surbaze de meza nombro de atendotaj kongresanoj. Tiel longe, kiel tiu meza aliĝnombro ne estas superita, la LKK rigore respektu la sumojn indikitajn sub "elspezoj".

14) Plej malfrue ses monatojn post la kongreso LKK devas prezenti al la estraro kompletan reviziitan bilancon. Antaŭ la finkalkulo kaj fikso de eventuala profito povas esti subtrahitaj la financaj rimedoj, kiuj estis donitaj de fervojaj instancoj, sindikatoj, ktp, aŭ kiuj fontis de fondusoj.

15) Kaze de deficito LKK respondecas pri la likvido de ĉiuj ŝuldoj.

16) Kaze de profito 2/3 (du trionoj) el la sumo restas je dispono de la LKK. La reston LKK sendu al la kongresa garantia fonduso.

17) La kongresa garantia fonduso estas administrata de la IFEF-kasisto. El ĝi la estraro rajtas tute aŭ parte kovri deficitojn de kongresoj, kondiĉe ke ties LKK restis en la kadro de sia buĝeto kaj atentis la Kongresan Regularon same kiel eventualajn skribajn konsilojn de la estraro.

E. Oficiala programo

18) La programo pretigita de la LKK bezonas la aprobon de la estraro.

19) Kutimaj aranĝoj de la kongreso estas:

a) inaŭguro (solena malfermo);
Dimanĉe (10:00 – 12:00)
10:00 – 10:10 mallonga kultura programo (se eblas)
10:10 – 10:15 komencaj vortoj, prezentado de la prezidio kaj de la gastoj (gvidas prezidanto de LKK)
10:15 – 10:40 salutvortoj de la gastoj kaj de la aliaj instancoj (kun tradukoj, neceskaze)
10:40 – 10:50 mallonga kultura programo (se eblas)
10:50 – 11:00 paŭzo
11:00 – 12:00 salutparoloj de la reprezentantoj de la landaj asocioj (gvidas la ĉefkomitatano aŭ anstataŭanto)
-salutvortoj de la IFEF prezidanto; Honorigoj; malfermo de la kongreso
- himno
- organizaj informoj (prezidanto de LKK)

b) estraraj, komitataj kaj komisionaj kunsidoj;
c) faka(j) prelego(j), fervojaj aktualaĵoj kaj laŭeble vizito de fervojaj instalaĵoj;
d) kultur-artaj, folkloraj kaj turismaj aranĝoj;
e) ferma kunveno.
- konkludparoloj de la prezidanto de LKK, prezento de LKK-anoj
- konkludparoloj de IFEF prezidanto; fermo de la kongreso
- transdono / transpreno de flago

20) Kaze ke la prezidanto kaj la sekretario estas malhelpataj, la komitato nomumas prezidantojn por la unuopaj kunsidoj.
21) Komisiongvidantoj kaj komisiitoj raportas dum la plenkunsido. Ili rajtas fari rekomendojn al la komitato, kiu estas libera pridecidi ilin.□

*****

Modelo de Programo

Sabato	08.00 – 21.00	Akceptejo/informejo Gazetara konferenco
	20.00 – 21.00	Kunveno de la IFEF estraro kaj LKK Kunsido de la IFEF estraro
	21.00 – 23.00	Interkona vespero
Dimanĉo	08.00 – 13.00	Akceptejo/Informejo/Libroservo funkcias
	10.00 – 12.00	**Solena Inaŭguro**
	12.00 – 12.30	Komuna foto *tagmanĝo*
	14.00 – 18.30	Duontaga ekskurso 1 *vespermanĝo*
	20.30 –	Prelego pri la regiono, urbo; laŭtemaj konferencoj;
Lundo	08.00 – 13.00	Informejo/Libroservo funkcias
	09.00 – 12.00	**Nepublika komitatkunsido**
	09.00 – 12.00	Urba vizitado *tagmanĝo*
	14.00 – 17.00	**Kunsido de la faka komisiono**
	17.00 – 18.30	Movadaj aferoj; pri IFEF
	17.00 – 18.30	ILEI baza kurso *vespermanĝo*
	20.30 –	Distra vespero
Mardo	**09.00 – 12.00**	**Plenkunsido** *tagmanĝo*
	14.00 – 17.00	**Faka ekskurso**
	17.00 – 18.30	**Kunsido de la faka komisiono**
	17.00 – 18.30	ILEI baza kurso *vespermanĝo*
	20.30 –	Dancvespero / Bankedo
Merkredo	09.00 – 18.30	Tuttaga ekskurso *vespermanĝo*
	20.30 –	La venonta kongreso sinprezentas
Jaŭdo	**09.00 – 12.00**	**Ĉefa prelego kaj fakprelegoj** *tagmanĝo*
	14.00 – 16.00	**Fakprelegoj**
	14.00 – 16.00	ILEI baza kurso
	16.00 – 17.00	**Solena fermo**
	17.00 – 17.30	Kunveno de la IFEF estraro kaj LKK
	17.30 – 18.30	Konkluda kunsido de la IFEF estraro *vespermanĝo*
	20.30 –	Ĝisrevida vespero
Vendredo	09.00 –	Duontaga ekskurso 2
Sabato, Dimanĉo….		Postkongresa programo

X. Aldono FR (REGULARO de la FAKA KOMISIONO)

A. Ĝeneralaĵoj

1) Tiu ĉi regularo validas por la laboro de la "Faka Komisiono". Ĝia agado estu konforma al la IFEF-statuto.

B. Taskoj

2) La Faka Komisiono havas jenajn taskojn:
   a) kompili kaj ĝisdatigi la fervojfakan terminaron kaj fari ĝin utiligebla en konvena maniero;
   b) doni konsilojn pri fervojaj terminoj, kiam petitaj;
   c) stimuli la pliriĉigon de fervojfaka literaturo, ekzemple la tradukon de konvencioj aŭ la verkadon de fakaj artikoloj kaj ties eldonon kaj tiel profesie klerigi la membrojn de IFEF;
   d) kunlabori kun terminologiaj centroj kaj institucioj;
   e) subteni la aranĝadon de fakaj prelegoj kaj referaĵetoj "Fervojaj Aktualaĵoj" laŭ kongresa regularo sur plejeble alta nivelo;
   f) laŭ peto helpi en fakprelegoj okaze de aliaj renkontiĝoj;
   g) montri la taŭgecon de la Internacia Lingvo por la traktado de fakaj temoj;
   h) eldoni laŭbezone internacian komunikilon, nome "Terminara Kuriero" (TeKu) kaj kolektaĵon de fakaj artikoloj "Fervojfakaj Kajeroj".

C. Konsisto

3) La faka komisiono konsistas el du sekcioj, nome la "Terminara Sekcio" kaj la "Fake Aplika Sekcio".
   La faka komisiono estas gvidata de:
   a) gvidanto, kiu ĝin reprezentas kaj donas la direktivojn;
   b) sekretario de la Terminara Sekcio, kiu ankaŭ prizorgas la redakton de TeKu;
   c) sekretario de la Fake Aplika Sekcio, kiu ankaŭ prizorgas la redakton de Fervojfakaj Kajeroj;

4) Al la komisiono apartenas:
   a) unu aŭ pluraj komisionanoj el ĉiu landa asocio. Ili formas konsilantaron, kiu funkcias dum 3 (tri) administraj jaroj (§ 6). Pro la diversfakaj taskoj de la komisiono la komisionanoj rajtas elekti, ĉu ili intencas kunlabori en la terminara aŭ en la fake aplika aŭ en ambaŭ sekcioj. Ili skribe deklaru tion al la gvidanto kaj krome sian pretecon konservi la oficon dum kompleta periodo. La gvidanto

informu la redaktoron de TeKu, kiu publikigas nomojn, adresojn kaj preferitajn taskojn;

b) po unu komisionano kompetenta pri la respektivaj prelegoj en la gastiganta kaj gastigonta landoj, kiuj funkcias de kongreso al kongreso.

5) Ĝis la jarfino de jaroj post estrarelekto la landaj asocioj komunikas eventualajn ŝanĝojn pri la kunlaboranta(j) komisionano(j) al la sekcia-(j) sekretario(j), kiuj informu la gvidanton antaŭ la fino de januaro.

D. Elektoj

6) La komisiono elektas inter si la gvidanton, la sekretariojn. Tiu elekto okazas en la jaroj antaŭ la jaro de estrarelekto komence de la unua komisiona kunsido. Ĝi validas por tri organizaj jaroj. Reelekto eblas. La elektoj validas nur post konfirmo de la komitato.

E. Labormetodo

7) La programo de la IFEF-kongresoj enhavu minimume unu fakan prelegon, referaĵeto(j)n "Fervojaj Aktualaĵoj" kaj kunsidojn de ambaŭ sekcioj de la faka komisiono. Por tiuj kunsidoj la gvidanto, interkonsente kun la sekretarioj, sendas la tagordojn ĝis la 31-a de decembro al la ĉefkomitatano.

8) La kunsidojn prezidas la gvidanto aŭ, se malhelpita, de li nomumita anstataŭanto.

9) La terminara sekcio agu laŭ sistemo, kiu garantias la plej efikajn rezultojn kaj konsiderante la disponeblajn rimedojn kaj la laborfortojn.

10) La fake aplika sekcio agu laŭ jena labormetodo:

a) Jam dum la aktuala kongreso la sekretario interkonsentu kun la kompetenta respondeculo de la venonta kongreso pri la antaŭvidebla fakprelega temo. Ĝi, laŭeble, koncernu ĝenerale interesan problemon de la gastigonta lando. Se temo ne jam estas precizebla, la estonta LKK anoncu ĝin ĝis plej malfrue la 31-a de aŭgusto al la sekretario. Tiu sendos, se necese, helpajn gvidliniojn ĝis la fino de septembro.

b) La ĉefa fakprelego estu originale verkita, aŭ ĝi prezentu la opinion de eminentuloj de la koncema lando.

c) Por atingi laŭterminaran ĝustecon, la respondeculo por la fak-prelego prezentu la manuskripton ĝis plej malfrue 4 (kvar) monatoj antaŭ la kongreso al la sekretario de la sekcio, kiu, se konvene, submetas ĝin al la terminara sekcio.

d) La gastigonta LKK elektu kiel prelegonton kompetentan fakulon, kiu havu senriproĉan prononcon.

e) LKK disponigu en la kongreso sufiĉe da kompletaj tekstoj de la ĉefa

fakprelego, depende de la nombro de kongresanoj, kaj rezervon, por kontentigi postajn mendojn. Krome LKK preparu resumojn por estraranoj, komitatanoj kaj redaktoroj.

f) Interkonsente kun landaj asocioj la sekretario aranĝas koncizajn prelegojn, kies titoloj kaj resumetoj laŭeble aperu en la kongreslibro. Krome povas esti aranĝataj "Fervojaj Aktualaĵoj", kiuj estu lastmomentaj informoj.

g) La fake aplika sekcio kolektas en aparta listo indikojn pri kaj fake kaj lingvaj altnivelaj prelegoj kaj artikoloj surbaze de la tabelo en la "Historio de IFEF" (1984) kaj daŭre kompletigas ĝin. IFEF aperigu la aktualan liston en ĉiu jaro dividebla per 5 (kvin).

F. Fakprelegoj ekster federaciaj kongresoj

11) Prelegoj en universalaj kongresoj (UK).

a) Taskoj de la IFEF-sekretario:

1) administra preparado (mendo de salono por kontaktkunveno de fervojistaj kongresanoj);

2) informi la IFEF-komitatanon "A" ĉe UEA.

b) Taskoj de komitatano "A":

1) laŭeble fiksi la temon kaj aranĝi la preparon de la prelego, kunlabore kun la gvidanto de la faka komisiono, kaj interkonsente kun la IFEF-asocio, se la UK okazas en lando kun tia asocio;

2) informi la IFEF-sekretarion kiel eble plej frue pri la preparevoluo;

3) tuj post la prelego, havigi la kompletan kaj resumitan tekstojn al la gvidanto de la faka komisiono kaj al la sekciaj sekretarioj, kiu zorgu laŭeble por publikigo de la resumo en la IFEF-organo.

12) Prelegoj en aliaj renkontiĝoj:

La faka komisiono de IFEF informu la koncernan preleganton pri sia fake aplika agado kaj petu lin, adaptiĝi al tiu ĉi Regularo.

G. Demisioj

13) Intencota demisio de iu el la personoj sub cif. 3) b), c), estu anoncata al la ĉefkomitatano ĝis la 31-a de oktobro antaŭ fino de oficperiodo. □

XI. Aldono TL (TABELO pri LIMDATOJ)

Kiam	Kiu agas	Al kiu anoncas	Pri kio	Rilate
post ĉiu IFEF-kongreso	IFEF-sekretario	ĝenerala sekretario de FISAIC	IFK venonta(j)	§ 2 c)
dum la kongreso	komitato	estraro	jarkotizo (konfirmo aŭ ŝanĝo)	§10 b)
31-a jan. kuranta adminis-tra jaro	landa asocio, individua membro	IFEF-kasisto	jarkotizo (pago)	§10 a)
31a aŭg. antaŭ fino de ofic -periodo	estraranoj kaj estroj de faka komisiono	ĉefkomitatano	demisio	GR 13)
31a aŭg. antaŭ kongresjaro	komisionano de gastigonta kongreslando	sekretario de fake aplika sekcio	temo pri la ĉefa fak-pralego	FR 10) a)
30a sep. antaŭ kongresjaro	sakretario de fake aplika sekcio	komisionano de kongreslando	gvidlinioj por ĉefa fakprelego	FR 10) a)
31a okt. antaŭ fino de ofic-periodo	sekratarioj kaj redak-toro de faka komisiono	ĉefkomitatano	demisio	FR 13)
31a dec. jaro da estrarelekto	landa asocio	ĉefkomitatano	delego de komitatano (j)	§ 13 1)
31a dec. jaro da estrarelekto	membroj	ĉefkomitatano	elekto da kromkomitatano	§ 13 2)
31a dec. jaro antaŭ estrar-elekto	kasisto landa asocio	ĉefkomitatano	elekto de revizoroj	§ 24 1)
31a dec. jaro antaŭ estrar-elekto	landa asocio	ĉefkomitatano	aprobo aŭ rifuzo al estrarkanditato	§ 16 d)
31a dec. jaro antaŭ estrar-elekto	kandidato por estraro	ĉefkomitatano	deklaro pri preteco	§ 16 e)
31a dec. antaŭ kongresjaro	membroj	ĉefkomitatano	proponoj por komitat -kunsidoj	§ 19 2)
31a dec. antaŭ kongresjaro	LKK	estraro	buĝeto	KR 13)
31a dec. jaro post estrar-elekto	landa asocio	sekretario de fake aplika sekcio	ŝanĝoj koncerne komisionanojn	FR 5)
31a dec. jaro post estrar-elekto	landa asocio	sekretario de terminara sekcio	ŝanĝoj koncerne komisionanojn	FR 5)
31a dec. antaŭ kongresjaro	gvidanto de la faka komisiono	ĉefkomitatano	tagordoj de komisionaj kunsidoj	FR 7)
5 monatojn antaŭ IFK	LKK	kongresanoj	baza kongreskotizo	KR 10)
unua komitatkunsido de jaro antaŭ estrarelekto	komitato	--	elekto de ĉefkomita-tano kaj anstataŭanto	§13 3) al3)a)
komitatkunsido de jaro kun triobla nombro	komitato	--	elekto de estraranoj	§17 §17a)
komitatkunsido de jaro de estrarelekto	komitato	--	elekto de revizoroj	§ 24 1)
komisiona kunsido de jaro antaŭ estrarelekto, gvidanto estas estrarano.	faka komisiono	--	elekto de gvidanto, sekretarioj, redaktoro de la faka komisiono	FR 6)
6 monatojn post la IFK de la kongresjaro	LKK	estraro	kongresa bilanco	KR 14)
1 monaton post la limdato de skriba voĉdonado	ĉefkomitatano	komitato, estraro	rezulto de la voĉdo-nado	§ 20

XII. Aldono OG (ORGANIGRAMO)



Membrokategorioj de IFEF				
Asociaj Membroj de la landaj asocioj	Individuaj Membroj	Honoraj Prezidantoj	Honoraj Membroj	Membroj de la Honora Patrona Komitato

Organizoj, kun kiuj IFEF havas rilatojn		
UIC IFEF estas membro de la Terminologia grupo por kontinue evoluigi datenbankon RailLexic pri fervojfakaj terminoj	**FISAIC** IFEF zorgis por ties starigo; iuj IFEF-landaj asocioj estas membroj de la Internacia Federacio de Kulturgflegantaj Fervojistoj	**UEA** IFEF estas Aliĝinta Asocio de la Universala Esperanto-Asocio
SAT IFEF estas subtenanta membro de la Sennacieca Asocio Tutmonda	**IEM** IFEF kunlaboras kun la Internacia Esperanto-Muzeo Vieno	**TEC de UEA** IFEF havas delegiton ĉe la Terminologia Esperanto-Centro
UMEA IFEF kunlaboras kun la Universala Medicina Esperanto-Asocio	**ILEI** IFEF kunlaboras kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj	**ISAE** IFEF kunlaboras kun la Internacia Scienca Asocio Esperantista
	IKEF IFEF kunlaboras kun la Internacia Komerca Esperanto-Federacio	

Regularo pri datumprotektado(GPRD) en IFEF

1. Pri Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (mallonge IFEF) estas parto de la internacia Esperanto-movado. Kadre de sia agado ĝi registras kaj prilaboras personecajn datumojn de siaj membroj kaj servouzantoj.

Respondeculo de la IFEF datumprotektado, la IFEF sekretario: Vito Tornillo IFEF kontaktadreso: sekretario@ifef.net

2. Kiujn datumojn, kiuj rilatas al via persono, registras kaj prilaboras IFEF?

2.1. Ĝeneralaj personaj datumoj:

a) **Identigaj datumoj**

IFEF registras nomon, titolon, sekson, naskiĝjaron, loĝlandon kaj datumojn pri Fakdelegitoj ĉe UEA.

b) **Kontaktdatumoj**

IFEF laŭbezone registras diversajn kontaktajn datumojn, provizitajn de la membroj kaj servouzantoj, kiel ekzemple la poŝta adreso, telefon-numeroj, kaj retpoŝtadreso.

c) **Datumoj pri membriĝoj, partoprenoj en kongresoj aŭ aliaj aranĝoj**

IFEF laŭbezone registras la datumojn pri membreco kaj membreca historio, IFK-partoprenoj (IFEF-historio). Krome IFEF registras datumojn por mendo de aldonaj servoj (hotelmendoj, mendo de ekskursoj).

d) **Komunikado inter IFEF kaj siaj membroj aŭ servouzantoj**

Cele al efika servado al siaj membroj IFEF registras kaj rajtas konservi retpoŝtajn mesaĝojn, ricevitajn de membroj aŭ servouzantoj kaj informojn, senditajn al IFEF pere de retaj formularoj, sociaj retoj kaj aliaj komunikiloj.

e) **Registro de datumoj, kaze de uzado de retejoj, aplikaĵoj aŭ ciferecaj servoj, administrataj de IFEF**

f) **Informoj, kiujn vi povus propravole transdoni al IFEF**

Vi povas mem decidi ĉu transdoni al IFEF aldonajn informojn. Jen ekzemploj: IFK-partoprenonto povas informi al IFEF pri siaj manĝpreferoj, pri deziro partopreni Esperanto-ekzamenon kaj sekve lingvonivelo, deziro havi korespondpartneron kaj sekve

klarigi pri hobioj kaj specialaj interesoj.

3. IFEF ricevas personajn datumojn jene:

a) **IFEF ricevas datumojn, kiujn vi mem elektas doni al ni,**
se vi aliĝas kiel membro de IFEF, aliĝas al kongreso, registriĝas kiel Amiko de IFEF, kontaktas nin, abonas revuon, diskutliston, novaĵleteron aŭ simile.
b) **IFEF ricevas personecajn datumojn de aliĝintaj landaj asocioj**
Aliĝintaj landaj asocioj povas peri personecajn informojn al IFEF por registrado de membriĝoj, aliĝoj al kongresoj, mendoj por kongresaj servoj kaj simile. Se vi ekzemple aliĝas al IFEF pere de landa asocio, la LA transdonas al IFEF la datumojn laŭ kiuj vi estas identigebla kaj konfirmas vian deziron esti membro de IFEF. Simile okazas, se vi aliĝas al kongreso pere de LA.

4. Por kiuj celoj IFEF uzas personajn datumojn?

a) **Membreco kaj servoj**
IFEF bezonas la personecajn datumojn por bonorde registri kaj administri vian membrecon, ekzemple por ekspedi al membroj-abonantoj revuon Internacia Fervojisto, sendi al IFK-aliĝintoj informojn pri la kongreso, kaj efike respondi iuajn demandojn de membroj aŭ servouzantoj en persona komunikado.
b) **Retaj servoj kaj aplikaĵoj**
IFEF bezonas la personecajn datumojn por bonorde doni al vi aliron al la ekzistantaj kaj kreotaj retaj kaj ciferecaj servoj.
c) **Por kreo de statistikaĵoj**
IFEF kalkulas statistikojn pri la membrokvantoj, aĝdistribuo, laŭlandaj membraroj kaj simile por evoluigo de pli bonaj membroservoj kaj pli bona planado de la Federacia agado.
d) **Informoj kaj informmesaĝoj**
Rilate al via membreco, kongresaliĝo, IFEF povas sendi al vi personigitajn informojn. Laŭ via deziro vi povas aboni aŭ malaboni tiajn informojn aŭ informmesaĝojn. Kun via permeso, IFEF ekzemple povas sendi al vi informojn okaze de gravaj okazaĵoj en la asocio. Por realigi la servojn IFEF povas uzi diversajn komunik-kanalojn, kiel ekzemple retpoŝton, poŝtan adreson, telefonon aŭ kun via permeso sociajn retejojn, kiel Facebook, WeChat, Ipernity aŭ simile.

5. Pludono aŭ montro de datumoj interne de IFEF aŭ ekster Asocio

5.1.

a)**Landaj Asocioj**

IFEF havas aliĝintajn Landajn Asociojn (LA), kiuj pagas kotizon ĉiujare por siaj "IFEF aliĝintaj membroj". Aliĝintaj LA rolas kiel perantoj de IFEF kaj havas aliron al la datumoj bezonataj.

b) **Estraranoj kaj Komisionanoj**

IFEF havas Estraron kaj Komisionojn. Anoj de la Estraro aŭ anoj de Komisionoj laŭokaze havas aliron al la datumoj de IFEF por realigi siajn taskojn.

5.2. Ĝeneralaj datumoj

En specialaj okazoj kaj pro specialaj celoj ni povas montri aŭ transdoni datumojn al servoliverantoj (entreprenoj, hoteloj, Landaj Asocioj aŭ simile).

a) **Por dissendi la revuon „Internacia Fervojisto"**

La dissendo de la revuoj al la membroj povas okazi pere de entreprenoj, kiuj produktas la adresetikedojn kaj dissendas la revuojn. Por tion fari, IFEF devas transdoni al tiuj entreprenoj la bezonatajn datumojn.

b) **Mendoj de kongresaj servoj**

Ĉe la mendo de diversaj kongresaj servoj, la transdono de nomlisto estas bezonata, en kelkaj okazoj la transdono de aldonaj identigaj dokumentoj estas bezonataj (ekz. por hotelo, ekskursoj). Kelkokaze ankaŭ la transdono de aliaj datumoj estas bezonata, kiel ekz. ĉu iu persono estas vegetarano, vegano aŭ bezonas specifan manĝon. La datumojn en tiaj kazoj IFEF devas transdoni al hoteloj, bufedaranĝantoj, ekskurso-organizantoj aŭ simile. Ĉiuj tiaj entreprenoj aŭ personoj devas sekvi la leĝojn pri protektado de privatecaj datumoj kaj ricevas nur nepre bezonatajn datumojn.

c) **Uzo ene de IFEF**

Ene de IFEF ni ĝenerale centre prizorgas la datumojn. Kompreneble IFEF zorgas, ke ekzistu la aliro nur al tiuj datumoj, kiuj por la koncerna tasko estas vere bezonataj. Ĉiuj rajtas uzi kaj prilabori datumojn nur se tio estas postulata de la komisiita tasko.

d) **Transdono de informoj al ŝtataj instancoj**
La leĝoj povas devigi nin registri aŭ malkaŝi unuopajn datumojn, kiuj rilatas al via personeco.

5.3 Aliaj retpaĝoj, paĝoj de sociaj retejoj aŭ simile
IFEF retpaĝoj, aplikaĵoj, paĝoj de sociaj retejoj aŭ novaĵleteroj povas enhavi ligilojn al aliaj retpaĝoj aŭ aliaj provizantoj. Se vi sekvas ian ligilon, vi forlasas IFEF retpaĝojn, aplikaĵojn, paĝon de socia retejo, novaĵleteron. Ĉi tiu regularo rilatas nur al IFEF servoj kaj ne al la servoj de aliaj. IFEF ne transprenas respondecon pri la uzado de viaj datumoj fare de tiuj aliaj. Ĉiu uzo de la servoj ekster IFEF okazas je propra risko. Por ricevi pliajn informojn pri la uzado de la datumoj, kiuj al vi rilatas, bv. kontroli la regularojn de la koncernaj servoj.

6. Sekureco kaj uzo de datumoj

6.1 IFEF faras ĉiujn eblajn teknikajn kaj organizajn paŝojn por plene protekti viajn datumojn kontraŭ perdo aŭ kontraŭleĝa uzo.
6.2 IFEF uzas la datumojn, kiuj rilatas al via personeco, nur tiom longe, kiom tio estas bezonata. Se vi membriĝas en IFEF aŭ se vi partoprenas en kongresoj, IFEF rajtas teni datumojn ankaŭ por pli longa tempo, ekzemple pro historiaj, esploraj aŭ membrorilataj kaŭzoj (Diplomoj por longdaŭra membreco, Honoraj Membrecoj kaj simile).

7. Internacia transdono de datumoj

7.1 IFEF estas internacia organizaĵo, kaj ĝi havas membrojn en pli ol 20 landoj. Ĝi povas uzi kaj transdoni datumojn, kiuj rilatas al via personeco, laŭbezone ankaŭ en landoj ekster via loĝlando, inkluzive de landoj ekster Eŭropa Unio. IFEF laboras internacie kaj ĝi havas kunlaborantojn kaj servoliverantojn en plej diversaj landoj. La leĝoj de la diversaj landoj havas malsamajn nivelojn pri protektado de viaj datumoj.
7.2 La transdono kaj uzo de datumoj, kiuj rilatas al via personeco, al landoj ekster via loĝlando estas foje bezonata. Pere de kontraktoj IFEF postulos al ekstereŭropuniaj partneroj garantion, ke viaj datumoj estu plej bone protektitaj laŭ tiu Regularo.

8. Viaj rajtoj

8.1 Vi rajtas kontakti IFEF, ĉe la adreso sube indikita, se vi volas uzi iun ajn rajton kiun vi havas laŭ la leĝo pri protektado de datumoj, specife la sekvaj rajtoj je:

a) **Kontrolo de viaj datumoj**

Vi rajtas demandi IFEF, ĉu ĝi traktas viajn personajn datumojn kaj, se jes, ricevi kopion de ili. Tiam IFEF samtempe donos al vi aldonajn informojn, ekzemple pri la kaŭzo kial IFEF traktas la datumojn, kaj pri la datumoj kiujn IFEF traktas, kaj iun ajn alian informon kiun vi bezonas por efektivigi vian rajton.

b) **Korekto de la datumoj**

Okaze de neĝusteco aŭ nekompleteco, vi rajtas je korekto de viaj personaj datumoj. Laŭ via peto, IFEF korektos malĝustajn datumojn kaj, post konsidero de la motivo de la traktado, IFEF kompletigos nekompletajn datumojn per aldono de plia datumo.

c) **Forigo de datumoj**

Vi havas ankaŭ la rajton pri forigo de viaj personaj datumoj, havataj de IFEF kaj, laŭeble, de iu ajn datumkolektanto al kiu IFEF antaŭe donis viajn datumojn. Tiu rajto je forigo ekzistas nur kiam la leĝo antaŭvidas ĝin, kiel preskribite de artikolo 17 de la Ĝenerala Reglamento pri Protektado de Datumoj (ĜRPD). Tiu rajto ekzistas ekzemple kiam viaj personaj datumoj ne plu estas bezonataj por la celoj por kiuj oni antaŭe traktis ilin kaj kiam ili estis kontraŭleĝe traktitaj. Pro teknikaj kondiĉoj, forigo de la datumoj de IFEF savkopioj povas daŭri pli longe.

d) **Limigo de la traktado de la datumoj**

Vi rajtas je limigo de la traktado de viaj personaj datumoj. Tio signifas, ke IFEF ne plu traktu viajn datumojn dum certa periodo. Tiu rajto povas ekzisti, ekzemple, se vi anoncis ke viaj datumoj estas neĝustaj, sed IFEF bezonas tempon por kontroli ilian ĝustecon. IFEF tamen rajtas pluteni viajn personajn datumojn. IFEF informos vin antaŭ ol ĉesigi la limigon de la traktado.

e) **Rajto je transdoneblo de la datumoj**

Via rajto je transdoneblo de la datumoj signifas, ke vi rajtas peti ke IFEF donu al vi viajn personajn datumojn en formato, kiu estas strukturita, ofte uzata kaj komputile traktebla, kaj ke vi rajtas peti ke IFEF sendu tiujn datumojn al alia datum-kolektanto, se tio eblas

teknike.

f) **Protesto kontraŭ traktado**

Vi rajtas ankaŭ protesti kontraŭ la traktado de viaj personaj datumoj; alivorte, vi rajtas peti ke IFEF ne plu traktu viajn datumojn. Tio validas nur, se la jura bazo por la traktado estas "licaj atendoj", inkluzive de aŭtomata klasigo. Se viaj personaj datumoj estas uzataj por rekta varbado, inkluzive de aŭtomata klasigo por rekta varbado, vi rajtas iam ajn protesti kontraŭ tiu varbado. En tiu okazo, IFEF ne plu traktos viajn datumojn tiucele.

8.2 Vi rajtas iam ajn nuligi vian konsenton, sekvante la instrukciojn rilate al la traktado pri kiu vi konsentis. Ekzemple, vi povas nuligi vian konsenton se vi uzas, en ret-mesaĝo, la ligon por malaboni, se vi modifas viajn preferojn rilate al komunikado en via konto (se tiuj ekzistas), aŭ se vi modifas la preferojn de via poŝtelefono (por anoncoj aŭtomate senditaj).

8.3 Se vi volas uzi viajn rajtojn sufiĉas skribi al IFEF **kontaktadreso: sekretario@ifef.net**

9. Aktualigo de la regularo

9.1. Ĉi tiu regularo povas esti korektata estonte. Informoj pri la ŝanĝoj aperos en la retejo; la principe gravaj ŝanĝoj estos dissendataj al IFEF-membroj.

La IFEF sekretario: Vito Tornillo

Reordigis en Majo 2015:
Romano Bolognesi, Vito Tornillo,
Rodica Todor, Jan U. Niemann
Valida ekde Januaro 2016